EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 36> ● ILEI por Azio ● Franca ILEI ● Koreio ● Benelukso < julio 1**

## Esperanto-Tago en aktiva preparo

Nur poste SMG rimarkis, ke dissendinte la komunikon EKO 35 en la 26a de junio (du tagojn pli frue ol la plano, ĉar ĉiuj kontrolistoj efike kaj rapide laboris), ni dissendis la informojn pri la Esperanto-Tago precize unu monaton antaŭ la Tago mem!

La ĉefaj mankantaj lingvoj por aperigo de la jam anoncitaj afiŝoj estas la araba, la persa (Ahmad Mamduhi kaj kolegoj certe povos solvi tion), la indonezia (Ilia Dewi), la hungara (SMG tuj saltos en la selon), la angla kaj la hindia. (Giridar Rao kaj teamo certe povos solvi iujn hindajn lingvojn). Pri la araba kaj la angla, neniu pli kompetentas ol Renato mem!

Por vidi la impresan liston de lingvoj en kiuj aperis la afiŝoj, kaj elŝutu la bezonatajn afiŝojn, vizitu la retejon: https://espereto.com/informiloj

## Kursa ekskurso

Bonvolu registri viajn kursojn en la KURSEJO de <edukado.net>
https://edukado.net/kursejo por ke ni havu realajn statistikaĵojn
: https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=movadajkursoj
Momente estas nur 42 movadaj kursoj en 12 landoj dise en la mondo:

## Kursoj fizikaj en Ĉinio

La 18an de junio, instruistoj de la elementa lernejo Baiyangshujie de la urbo Taiyuan, la provinco Shanxi, okazigis Esperantan kurson en la infana centro de loka loĝkvartalo.
Okaze de la Patrotago, la instruisto enkondukis la vorton "patro" kaj profesiajn vortojn, ekzemple "kuracisto", "laboristo" kaj "instruisto". Infanoj lernis kiel diri "feliĉan patrotagon". La interesa kaj amuza kurso multe plaĉis al la infanoj.
Dum pli ol dek jaroj la elementa lernejo Baiyangshujie aktive antaŭenigas Esperantajn kursojn kaj akiris subtenon de la eduka administracio kaj loka komunumo. Nun Esperanto ne nur fariĝis la nomkarto de la lernejo, sed ankaŭ estas konata de multaj lokanoj. Dum la kurso la televid-stacio de la urbo Taiyuan faris rektan elsendon.

Raportita de Xing Qishuang
Redaktoro: Zhao Wenqi

# La francaj instruistoj strebas refortigi sin

ILEI-Francio estas la franca grupo de esperantistaj instruistoj. Ĝi estas kaj faka asocio de Espéranto-France kaj landa sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Pri la kunsido vidu ĉe: https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio. SMG: La reta kunsido okazos en la 9a de oktobro, sed preparu vin jam nun!  Diskutu kune!

Ni plu serĉas volontulojn. Se vi konas instruistojn eĉ kiuj ankoraŭ ne parolas Esperanton sed interesiĝas, sciigu al ili! Ankaŭ studentoj estas bonvenaj.

Ni serĉas ankaŭ volontulojn por la estraro. Plue mankas prezidanto kaj vic-prezidantoj! Prezidanto kaj vic-prezidantoj ne bezonas okupiĝi pri administrado. Sufiĉas iom agadi en sia kampo. Ekzemple

- prezidanto povus okupiĝi pri eksteraj rilatoj, interalie kun oficialaj kaj profesiaj instancoj pri Edukado.
- vic-prezidantoj iom kunordigu agadojn en sia kampo, bazlerneja, mezlerneja, universitata, kaj studentajn agadojn.

Pri Esperanto en mezlernejoj jam agadas Emmanuel Desbrières kaj Aleks André. Ne lasu ilin sen helpo. Venu kun viaj proponoj, spertoj, agemo… por dividi ilin!

DJ (Didier Janot)

# Konversacia rondo el brazila universitato

Ni anoncas al vi konversacian rondon organizatan de projekto de por-komunuma agado “Lingvoj en Dialogo” (Línguas em Diálogo) de UFPR - Federacia Universitato de Paranao, en Kuritibo, Paranao, Brazilo, -- malferma al ĝenerala publiko, sub la titolo:

### “Lando Babila: Konversacia Rondo en Esperanto
/ A Terra do Bate-Papo: Roda de Conversação em Esperanto_2022a”

La renkontiĝoj okazos en platformo Teamso de Majkrosofto de la 18-a ĝis la 20-a horo (laŭ la Brazilja horzono; laŭ UTC: de la 21-a ĝis la 23-a horo) en la sekvantaj tagoj:

25-a de Junio; 30-a de Julio; 27-a de Aŭgusto; 24-a de Septembro kaj 29-a de Oktobro.
Cel-publiko: parolantoj kaj lernantoj de Esperanto.
Kiuj ĉeestos minimume kvar renkontiĝojn, tiuj ricevos atestilon de la Universitato.
Interesatoj aliĝu per retmesaĝo al <led@ufpr.br>, kaj informu:

- plenan nomon;
- CPF-numeron (brazilanoj) aŭ pasport-numeron;
- retadreson por registro en Teamso;
- ĉu vi havas ian ligon al UFPR? (Specife: ĉu vi estas studento, docento, oficisto de UFPR? – informo uzota nur por statistika raporto).

Organizantoj: Ivan Eidt Colling, Rita de Moraes kaj Lígia Maffessoni Penia.

# Korea Respubliko raportas siajn kursojn

La respondo okazis pere de laboro de ILEI arigi kursinformojn.

- Du lernejoj instruas Esperanton en laŭleĝa studobjekto:

- Du terenoj (la urbo Seulo, kaj Yong-in) de Hankuk Universitato de fremdaj studoj, kiel elektiva studobjekto, 2 kreditoj por semestro kaj la - virina altlernejo Moonil en la urbo Incheon, Koreio

Baze de printempo, 2022, nun 52 kursoj (ĉefe landaj, kaj inkluzive 4 internaciajn) estas okazintaj en Sud-Koreio: filioj kaj filietoj de KEA, ĝeneralaj rondoj, sociaj edukejoj, SNS-kakaoktoko, Zomo, Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK), universitataj rondoj, diversaj studgrupoj ktp. Dume ĉefe troviĝis retaj kursoj, sed nun ili iom post iom havas ĉeestajn. Dank' al la Kronviruso koreaj esperantistoj ofte povas kune sidi kaj intervidi per zomo kaj skajpo. Oni ne povas facile konekti kun ili pro la studo ĉiuvespere de lundo ĝis vendredo.

Sekciestro por Koreio (ROK), PARK Soohyean

## Irano kaj ILEI subtenas lingvan perfektigon

Jen fotoj, kiujn faris Ahmad Mamduhi en sesio de la B2-kurso en la 26a de junio.




## Ondeto de Ondoj

La redakcio de "La Ondo de Esperanto" disponigis en la reto ankoraŭ du numerojn de "La Ondo" – la printempan (laŭ la nord-hemisfera vidpunkto) por 2020 kaj la someran por 2021. Ili estas senpage elŝuteblaj kaj legeblaj laŭ la normoj "pdf" kaj "ePub". Elŝutu, legu kaj, se vi ial ankoraŭ ne abonas, decidu pri via abono https://sezonoj.ru/2022/06/ondo-100/

## Benelukse, sed ja lukse

Tiu trilanda kongreso okazos inter la 23a kaj 25a de septembro 2022. BE-NE-LUX estas la nomo kiun oni donas al la regiono kiu konsistas el la landoj: BElgio, NEderlando kaj LUXemburgo

La kongresurbo estos Ieper (Ypres), Ieper [Ipro] estis viktimurbo (preskaŭ plene detruita) dum la Unua Mondmilito kaj la memoro pri tiu Granda Mondmilito estas ankoraŭ viva en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Ne senkiale la urbo titoligas sin Pacurbo. Daŭre atestas pri la mondmilito grandega nombro de militombejo. La urbo ankoraŭ

nun estas pilgrimejo por britoj, kanadanoj, aŭstralianoj, novzelandanoj, hindoj kiuj perdis parencojn dum tiu milito. La Menenpoort [Menen-pordego] estas fama monumento en Ipro, kiu ĉiun tagon estas la scenejo de '*Last Post*'-klarionsonado.

La 21-a estas la Internacia Tago de la Paco. Kadre de tio, internacia UNESKO-komitato organizas internacian korus-pacfestivalon al kiu kontribuas multaj korusoj el la tuta mondo. Unu el la partoprenantoj estas la solidareckoruso "Vamos pra Lutar", kies membro estas Piet Glorieux, esperantisto. Li instigis la koruson partopreni kaj koncerti la 24an de septembro kadre de pac-evento organizita kunlabore kun la urbo.

Esperanto ricevas apartan lokon en la programo de la pac-evento. Ni i.a. havos la disponon pri prestiĝa domo "Vleeshuis" en la urbocentro por informi diversmaniere pri Esperanto dum la pac-evento. Koincidas kun tiu evento la Flandra Esperanto-Ligo (FEL) organizas Beneluksan kongreson.

Ironia komento SMG: Mi ne klarigos al vi la signifon de la 'Vleeshuis', por protekti vian partoprenadon de veganoj kaj vegetaranoj.

## Aliĝu al VEKI-3 – la virtuala kongreso de ILEI

vi povos ĝui la prezenton: ligo jutuba: https://youtu.be/6Uo-NrkuBP4

ligo en *facebook:* https://fb.watch/dVha9PcHDB/

prof. laura brazzabeni, +39 3286461063 (anche whatsapp)

direttore generale IIE: http: istituto.esperanto.it

## Pri artefaritaj lingvoj en Francio

De la fino de aprilo ĝis la frua parto de junio okazis Ĉiu-semajna seminario pri artefaritaj lingvoj en la Universitato de Tours (Francio), kun prezentoj de pluraj priesperantaj prelegoj. Elŝutu la dokumenton ĉe: https://mallonge.net/pj
**en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/watch?v=zhWPgn9sUTE**

**Informo venis tra ESF. Eble la verkinto estas Bruno Flochon. Enplektita estas: Dubourg Glatigny Pascal, <pascal.dubourg che cnrs.fr>.**

========= vortoj: 1050 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anojn de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.